FN PER ANC 47

★ **Normanda Esperanto Bulteno** ★

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO N°I5

- FEBRUARO I97I -

Redaktas: S-ro E. JOUIS - 62I Rue Georges Mugnier - 76 - BOISGUILLAUME.
Sendu la manuskriptojn antaŭ la I0a de Februaro, I0a de Majo, I0a de Aŭgusto, I0a de Novembro.

E N H A V O.

- Kongresu !
- Turisma Kalendaro.
- S.A.T.Amikara Kongreso en Yvetot.
- Federacia Kongreso en Mantes la Jolie.
- Markola Kongreso.
- Kiel kolekti novajn simpatiajn membrojn.
- Kiel propagandi Esperanton ( Daŭrigo )
- Vivo de la Grupoj.
- La reĝo de Yvetot.
- Grava Alvoko.
- Korespondpetoj.

==================================================================

## K O N G R E S U !!

En la Esperanto Movado, oni ofte kongresas. Ĉiujare okazas multegaj renkontiĝoj, ĉu fakaj, ĉu regionaj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj. Kial tiom da kongresoj? Tute simple ĉar la Esperantistoj, ankoraŭ ~~tro~~ disaj, sentas la bezonon renkontiĝi por interŝanĝi ideojn pri siaj ĉefaj propraj interesoj, aŭ pri la problemoj rilataj al la disvastigo de la lingvo, aŭ pli simple por retrovi amikojn, ofte eksterlandajn, konatiĝi kun korespondanto, aŭ parole ekzercadi la lingvon.

Tiu bezono de komunikado estas ~~nepre aprobinda. Ni neniam tro~~ ofte renkontos aliajn Esperantistojn. Efektive, ju pli nia lingvo estos parolata (kaj ne nur skribata) des pli vivanta ĝi estos. Kaj la kongresoj estas ankaŭ bona maniero impresi la publikon kaj demonstracii, ke nia lingvo plene taŭgas por sia celo. Do, ĉeestu kongreson almenaŭ unufoje ĉiujare.

Por helpi vin elekti la kongreson ( aŭ la kongresojn ), kiuj vi ĉeestos ĉi-jare, ni publikas en tiu numero la longan liston de la ĉefaj ren-

kontiĝoj. Sed ni devas jam nun atentigi vin pri tiuj kiuj povas precipe interesi la Normandojn, kaj kiuj estas, laŭ kalendara ordo:

- I0an - I4an de Aprilo. Kongreso de S.A.T.Amikaro en Yvetot.
- Ioan - I4an de Aprilo. Kongreso de U.F.E. en Lyon.
- 24an - 25an de Aprilo. Komuna KOngreso de la Normanda Federacio kun la Parisa Federacio de U.F.E. en Mantes la Jolie.
- 29an - 3Ian de Majo. Markola Kongreso en Calais ( Internacia.)
- 3Ian - 7an de Aŭgusto. Kongreso de S.A.T. en Parizo.
- 3Ian - 7an de Aŭgusto. Universala Kongreso de U.E.A. en Londono.

Elektu.!! Sed ne lasu forpasi okazon praktiki Esperanton kaj retrovi la amikan(rtoson, kiu karakterizas niajn kongresojn. Vi ne bedaŭros vian vojaĝon.

================================================================

## - MARKOLA KONGRESO -

Ĉi-jare, tiu kongreso, kiu ĉiam grupigas Esperantistojn el pluraj landoj, okazos en Calais, je Pentekosto, de la 29a ĝis la 3Ia de Majo.

Ĉirkaŭ 200 partoprenantoj estas atendataj, precipe, Francoj, Angloj, Belgoj kaj Nederlandanoj. Samtempe kaj samloke okazos la Kongreso de la Belgaj Esperantistoj.

Tiu internacia Kongreso estas nepre rekomendinda.

Por ĉiuj informoj, skribu al S-ro Fernand DITACROUTE.

I78 Chemin Castre

62 - CALAIS.

Kotizo por Francoj: I4 Frankoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Kiel varbi novajn lernantojn?

Sub tiu titolo ni komencis aperigi serion de artikoloj en Normanda Esperanto Revuo.

La abundo de informoj pri la vivo de la grupoj kaj pri la diversaj kongresoj devigas nin prokrasti la aperigon de la artikolo pri la uzo de prospektoj.

Ĝi aperos en la venonta numero.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

## ĈU VI PAGIS ĈIUJN VIAJN KOTIZOJN POR I97I.?

Se ne, faru tion tuj, por ne forgesi.

Ankaŭ mono forte kontribuas al la propagando de

E S P E R A N T O.

- KOMUNA KONGRESO de la NORMANDA kaj PARIZA FEDERACIOJ. -
de KULTURCENTROJ de ESPERANTO.-
24-25 an de APRILO 1971. URBODOMO. MANTES LA VILLE. YVELINES.

---

P R O G R A M O.

SABATON 24an de Aprilo.

- 14a horo: Akceptado de la Kongresanoj en la stacidomo aŭ en la Urbodomo de Mantes la Ville.
  Publika Ekspozicio.
  Vizito de Mantes la Ville kaj Mantes la Jolie.
  Ekzamenoj.
- 19a horo: Komuna Vespermanĝo en Mantes la Jolie.
- 20a h 30: Distra Vespero kun Filmoj.

DIMANĈON 25an de Aprilo.

- Ek de la 9a Normanda Kongreso.
- 10a horo: Pariza Kongreso.
- 11a h 30: Akceptado de la Aŭtoritatuloj.
- 12a h 30: Komuna Tagmanĝo en Mantes la Jolie.
- 14a horo: Distra Posttagmezo. Varietaĵoj. Teatro. Skeĉoj. Kantoj.

Ni esperas, ke vi venos multnombraj, des pli ke amasa partopreno de Esperantistoj en kongreso en urbo, kie oni ankoraŭ scias preskaŭ nenion pri Esperanto, multe impresos la publikon, kaj grave helpos la propagandan laboron de la ĵus fondita grupo.

Do, venu amase!!! Mantes la Ville vokas vin!!!!

Helpu nin sendante vian aliĝilon antaŭ la 1a de Aprilo kaj la pago al :

Federation Parisienne Esperanto.
C.C.P. PARIS 10482 - 04

Aliĝkotizo. 5 Frs sen tagmanĝo.
24 Frs kun Tagmanĝo.

Ne forgesu diri ĉu vi deziras trapasi ekzamenon, kaj kiun.

Eĉ se vi ne povas partopreni, vi rajtas aliĝi......DANKON.!

La Prezidanto de la
Normanda Federacio.
S-ro Edgar JOUIS.

La Prezidanto de la
Pariza Federacio.
S-ro Jean GUILLAUME.

"="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="="=="

- KIEL KOLEKTI NOVAJN SIMPATIAJN MEMBROJN. -

Baldaŭ estos la ĝeneralaj elektadoj de la lokaj magistratoj, meze de Marto. Do estas tre taŭge por prezenti la kartojn al ties kanditatoj, tiamaniere vi konatiĝos ne nur Esperanton sed ankoraŭ la vivon de la Esperanta movado

Kuraĝu kaj ne timu.!!!
Ili estos tre feliĉaj akcepti vin kaj vian membrokarton ~~pro tio~~, ke vi estas intêr la voĉdonantoj.!!!!
Se vi ne havas tempon kontakti ilin, skribu kelkajnvortojn kun la membro-karto.

S-ro Saunier Bernard.

# - K O N G R E S O D E S.A.T.A M I K A R O.

Junldomo de Yvetot. IO ĝis I3 de APRILO I97I.

---

Laŭ peto de S.A.T.Amikaro, la Kultura Centro de Esperanto en Yvetot nun aktive preparas la Kongreson de tiu organizo.

Jam pli ol 90 personoj aliĝis, el kiuj 20 eksterlandanoj el Nederlando, Belgujo, Anglujo kaj Germanio.

Jen la Programo de tiu Kongreso.

SABATON IOan de Aprilo.

- 9a 30 - Malfermo de la Akceptejo en la Junuldomo.
  Libro-servo - Ekspozicioj.
- I2a H - Tagmanĝo.
- I4a30 - Ekzamenoj, aŭ vizito de la urbo.
- I7A H - Kunveno por la novuloj.
- I8a h - Oficiala akcepto en la Urbodomo.
- I9a H - Vespermanĝo.
- 2Ia H - Interfratiĝa vespero.

DIMANĈON IIan de Aprilo.

- 8a 30 - Malfermo de la Junuldomo.
- 8a 45 - Solena malfermo de la Kongreso.
  Unua laborkunsido.
- I2a 30- Bankedo.
- I5a H - Duontaga Ekskurso.
- I9A H - Vespermanĝo.
- 2Ia H - Distra Vespero.

LUNDON I2an de Aprilo.

- 8a 30 - Malfermo de la Junuldomo.
- 8a 45 - Dua laborkunsido.
- IIa30 - S.A.T.Kunveno.
- I2a H - Tagmanĝo.
- I4a H - Tria laborkunsido.
- I6a 30 - Lotumado.
- I9a h - Vespermanĝo
- 2Ia H - Adiaŭa Vespero.

MARDON I3an de Aprilo.

Tuttaga ekskurso.

Ĉiuj Normandoj estas kore invitataj. Por multaj komencantoj tio estas la unua okazo praktike uzi la lingvon kun eksterlandanoj. Do, venu amase, sed anoncu vin kiel eble plej frue ĉar estas nur malmultaj hotelĉambroj.

Vi trovos en tiu bulteno aliĝilon. Nepre resendu ĝin antaŭ la 25a de Marto.

Por ĉiuj informoj, bonvolu skribi al:

Sinjorino POTTIER Claudine
50 Résidence Fief de Caux.
76 - YVETOT.

# A L I Ĝ I L O

ANTAU OL PLENIGI VIAN ALIGILON, bonvolu atente legi la informojn ĉe la dorso.

| | | | |
|---|---|---|---|
| NOMO. | ANTAUNOMO. | S.A.T. Amikara N° | au GASTO. |
| EDZ(IN)O. | ANTAUNOMO. | S.A.T. Amikara N° | au GASTO. |
| INFANO(J) | ANTAUNOMO. | Aĝo(j) | |
| ADRESO. | | | |

Ĉu vi alvenos aùtomobile?.......

Mi deziras ricevi.........rabatilojn S.N.C.F. - Je kioma horo vi alvenos?.....
" trapasi ekzamenon: ....... Indiku la gradon:.......
" partopreni la distran programon. ( Faru proponon.)
" tendumi.......Respondo:
" manĝi vegetarane.........Respondo:

Kiu aliĝas, tiu antaùpagu la tuton. En okazo de lastminuta ne partopreno; la O.K.K. repagos, escepte de la aliĝkotizoj, kaj rezervigo de hotelĉambroj.

- ANTAUPAGOJ -

| | | Nombro | Prezo | Sumo |
|---|---|---|---|---|
| KONGRESKOTIZOJ. | Membroj | | x | = |
| | Junuloj | | x | = |
| | Gastoj | | x | = |
| SUBTENKOTIZO. | | | x | = |
| a) JUNULARGASTEJO | Sabato. | | X | = |
| por ĉiuj aù | Dimanĉo | | x | = |
| b) AMASLOĜEJO nur | Lundo | | x | = |
| por inoj | Mardo | | x | = |
| HOTELĈAMBROJ. por.... pers. | | | | |
| Kategorio A.B.C.D. | | | | |
| Rezervita prezo: | Sabato. | | x I2,00 | = |
| | Dimanĉo. | | x I2,00 | = |
| | Lundo. | | x I2,00 | = |
| | Mardo. | | x I2,00 | = |
| MANĜOJ. | Sabato tagmeze | | x 6,00 | = |
| | Lundo tagmeze | | x 6,00 | = |
| BANKEDO. | Dimanĉo tagmeze | | x I5,00 | = |
| EKSKURSOJ. | Dimanĉo tagmeze | | x 8,00 | = |
| | Mardo tuttage | | x 25,00 | = |
| MENDOJ. | Kongresglumarkoj po 20 por 2 Frs+ send. | | | |
| | | | Sumo | |

Bonvolu nenion skribi sur tiu partc

TUJ SENDU ĈI TIUN FOLION KAJ LA MONON AL LA KASISTO DE LA O.K.K.

Ni konsilas al vi fari kopion de tiu ĉi kalkulo, kaj ĝin konservi.
a), b), Bonvolu substreki la deziratan lokon. Dankon.

SUPPLEMENT AU N° 262 DE S.A.T.AMIKARO - DECEMBRO I970
26a Kongreso de S.A.T.Amikaro - I0 - II - I2 - I3 APRILO I97I - YVETOT.

# I N F O R M O J

**KONGRESKOTIZOJ :** - Ĝis la Ia de Februaro I97I - Membro: I4 Fr. Gasto: 22 Fr
Post la Ia de Februaro I97I - Membro I6 Fr. Gasto: 27 Fr
Infano malpli ol I5 jara ne pagas.
Junulo de I5 ĝis 20 jara pagas duonkotizon.

**SUBTENKOTIZOJ:** - Kiuj ne povas ĉeesti la kongreson, tiuj ricevos la kongres-dokumentojn kontraŭ subtenkotizo je I0,00 Fr

**KAMPADEJO** - Por karavanoj kaj tendoj.

**AMASLOĜEJO** - Nur por inoj, unuopaj ĉambroj: I persono 5 Fr po nokte( sen matenmanĝo)

**JUNULARGASTEJO** - Por dormi, 4 Fr po nokte, senmatenmanĝo

**HOTELĈAMBROJ** - Precizu klare kion vi deziras rezervi : Kategorio, nombro da ĉambroj, nombro da personoj, ktp - Jen la prezoj, ne inkluzive la matenmanĝon
A - I persono ( I lito).......I0 Fr, I4 Fr. Nokte.
B - 2 personoj ( I lito).... I0 Fr, I6 Fr, 25 Fr Nokte.
C - 3 personoj ( 2 litoj) ...I0 Fr, I4 Fr, I6 Fr, 20 Fr 32 Fr,50, Nokte.
D - 4 personoj ( 2 litoj) ..... I8 Fr, 23 Fr, Nokte.

**MANĜOJ** - Ordinaraj simplaj manĝoj Tagmeze kaj vespere, en la restoracio de la Junulardomo. Prezo: 6 Fr. (ne inkluzive la trinkaĵo.)
Por la vespermanĝoj la kongresanoj pagos surloke
En kelkaj hoteloj, la vespermanĝoj estas devigaj
Bankedo:Ĝi okazos dimanĉo tagmeze en la restoracio de la Junulardomo. Prezo: I5 Fr,00( inkluzive la trinkaĵo.)
Vegetaranoj estos servitaj laŭplaĉe. Anoncu vin

**EKSKURSOJ** - Dimanĉo posttagmeze - Promenado per busoj okazos laŭlonge de la Sejno. Ni vizitos St WANDRILLE - CAUDEBEC en CAUX - VILLEQUIER - LILLEBONNE - ALLOUVILLE BELFOSSE - Prezo 8 Fr.
Mardo tuttage Ni veturos tra HONFLEUR - PONT DE TANCARVILLE LE HAVRE - ETRETAT - FECAMP. Prezo kun tagmanĝo 25 Fr.
Horo de la plej tuja trajno al Parizo 20H5. Reveno al Yvetot je la I9H30.

**PREZOJ** - Ĉiuj prezoj ĉi-supraj estis al ni konsentitaj sen firma garentio; ni tamen esperas, ke ili validos ĝis la kongreso.

**ANTAŬPAGOJ** - Ni garantias la ĉi-suprajn servojn nur al tiuj; kiuj antaŭpagos.

**LIMDATO** - Pro la kondiĉoj al ni truditaj, ni ne povos zorgi pri la aliĝoj kiuj alvenos post la 25a de Marto.

**PAGO** - Ĉiuj prezoj estas en francaj frankoj. La gekamaradoj ekster Francio pagu per internacia poŝtmandato aŭ internacia ĝiro al la poŝtkonto de la kasisto.

LA ALIĜILON KAJ PAGON VI SENDU KIEL EBLE PLEJ FRUE AL LA KASISTO:
S-ro SAUNIER Bernard. Louvetot. 76 -CAUDEBEC en CAUX.

KIUJ PAGAS PER C.C.P., UZU TIUN ADRESON
CENTRE CULTUREL D'ESPERANTO HOTEL DE VILLE 76 - YVETOT
C.C.P.I284 - 35 D ROUEN.

SEKRETARIINO : S-ino POTTIER 50 Residence Fief de Caux 76 - YVETOT.

# - I97I - T U R I S M A K A L E N D A R O.

Planu viajn venontajn feriojn, kaj elektu !

- MARTO -
- I4 - I5. Tagoj de Svisa Esp. Societo Olten . Svisujo
- 20 . Internacia Renkontiĝo. Leipzig G.D.R.

- APRILO -
- 3 - 5 . IOa Kulturfestivalo de Bulgara Esp. Junularo. Sofio.Bulg.
- 4 - 9 . IOa Paska Kultura Semajno. Gresillon. Francio.
- 5 - I2 . Junulara Renkontiĝo en la kadro de la U.F.E Kongreso. Lyon. Francio.
- 9 - I2 . 55a Brita Kongreso. Weston super Mare. Britio.
- 9 - I2 . 49a Germana Kongreso. Nürnberg .F.R.G.
- 9 - I3 . 63a Kongreso de Unuiĝo Franca por Esp. Lyon. Francio
- 9 - I6 . Studsemajno. Gresillon. Francio.
- IO - I3. 26a Kongreso de S.A.T.Amikaro. Yvetot. Francio.
- I3 - 25. Aranĝo de Hungara - Pola Amikeco. Budapeŝto. Hungario.
- I8 . Komerca Foiro. Lille. Francio. Posttagmeze Ekzamenoj.
- 23 . Izralea jarkonferenco. Tel Aviv. Izraelio.
- 24 - 25. Kongreso de la Normanda kaj Pariza Federacioj de U.F.E. Mantes. Francio.
- 25 - I/5 Proletara Revolucia Laborkunveno de progresemaj Esp. Milano. Italujo.

- MAJO -
- 4 - I7 . Printempaj Esp. Ferioj. Lubostron. Polujo.
- I5 . Jarkunveno de Nederlanda Esp. Asocio. Leen Arnhem. Ned.
- I5 - 2I. 23a Internacia Fervojista Esp. Kongreso. Maribor. Jug.
- 29 - 3I. Jarkogreso de Sveda Esp. Federacio. Stockholm. Svedujo.
- 29 - 3I. 9a Internacia Markola Kongreso. Calais. Francio.
- 29 - 3I. Kunveno de S.A.T. Junulfako. Haarlem. Nederlando.

- JUNIO -
- I6 - 20. 5a Int. Turisma Renkontiĝo en Moravio. Kralovec.Ĉekos.
- 30 - 4/7.Usona Kongreso. San Antonio. Texas. Usosno.

- JULIO -
- I - I4 . Perfektigaj Ferio-Kursoj de Esp. Swornigacie. Pollando.
- I - I5 .Internacia Kampadista Renkontiĝo. Baraluc les Bains. Fr.
- 4 - IO . Somera Esp. Universitato. Gyula. Hungario.
- 4 - II . Int; Baltmara Semajno en Rosbtock. Rostock. D.G.R.
- 4 - 25 . Kulturaj Esp. Semajnoj en Gresillon. Frahcio.
- 7 . Internacia Esp. Renkontiĝo. Rostock. G.D.R.
- I2 - 3I . Internacia Esp. kursoj. Pamporovo. Bulgario.
- I4 - 2I . Akropolo 7I. Ateno. Grekujo.
- Meze de Julio: 4a Internacia Tendumo de Esperantistaj infanoj Pecs. Hungario.
- I5 - 29 . Somera Universitato pri Balatomo. Veszprem. Hungario.
- I7 - 20 . 3a Kultura Festivalo de Pola Esp. Junularo. Bjalitosko. Pollando.
- I7 - 27 . 4a Int. Renkontiĝo Naturamika en Abaliget. Abaliget. Hungario.
- I7 - 30 . 3a Kultura Festivalo kaj Int. Esp. Ferioj. Torun. Pol.
- I7 - 3I ; Esp. Labortendaro. Roccasecca. Italio.
- 2I - 25 . 7A Internacia Esp. Seminario. Torun. POLLANDO.
- 24 - 3I . Kristana Kongreso ( KELI). Abingdon. Britujo.
- 25 - 29 . Studenta Renkontiĝo. Bydgoszcz. Pollando.
- 25 - I/8. 40 Jara Feria Kurso. Helsingor. Danlando.
- 25 - 7/8. Kulturaj kaj Turismaj Ferioj. Gresillon. Francio
- 25 - I5/8. Skolta Vaga Esp. Tendaro. Pollando.
- 26 - 7/8. Tendumado de Esp. Junuloj. Kiev. Sovetunio.

- 30 - 6/8. I2a INTERNACIA Infankongreseto. Kent. Britujo.
- 30 - 27/8 Someraj Universitataj Kursoj. Lieĝo. Belgio.
- 3I - 7/8. 56a Universala Kongreso de U.E.A. Londono. Britujo.
- 3I - 7/8. 44a S.A.T. Kongreso. Parizo. Francio.

- AUGUSTO-

- 2 - 2I. Internaciaj Esp. Kursoj. Pamporovo. Bulgario.
- 6 - I3 . Libervola restado post int. Infankongreseto. Ken. Britujo.
- 7 - I3 ; Postkongresa feriorestado en Barlaton. Britujo.
- 7 - I4 . Postkongreso de la 56a U.K. Dublin. Irlando.
- 7 - I4 . Postkongreso de S.A.T en Gresillon. Francio.
- 7 - I4 . d° en Les Houches. Alpoj. Francio.
- 7 - I4 . d° en Balaruc les Bains. Francio.
- 8 - I2 . Tagoj en Kievo. Sovetunio.
- 8 - I2 . Postkongresa ekskurso de U.E.A. al Exeter. Exeter. Britujo.
- 8 - I2 . d° al Skotlando.
- 8 - I4 . Internacia Junulara. Kongreso. la 27a de TEJO. Edinburgh. Skotlando.
- I2 - 26. I3a Tendaro de Junaj Sovetaj Esp. en Kiev. Sovetunio.
- I4 - 29. Esp. Ferioj en montaro. Pisek. Cekoslovakio.
- I5 - 4/9 Studsemajnoj. Gresillon. Francio.
- 22 - 28. 6a Seminario por kvidantoj. ( TEJO) Belgio.

- SEPTEMBRO-

- 5 - I2 . Seminario pri lingvo kaj Kulturo. Strasbourg. Francio.
- 6 - I9 . Internaciaj Esp. Ferioj. Pamporovo. Bulgario.

- OKTOBRO -

- 2 - 8 . 4a Pupteatra Festivalo. Zagrebo. Jugoslavio.
- I7 - 23; Aùtunaj Feriaj Esp. Kursoj. Helsingor. Danlando.

- DECEMBRO -

- 27 - 3/I/72. 7a Vintoaranĝo de Pola Esp. Junularo. Pollando.
- 27 - 3/I/72. I5a Seminario de Germana Esp. Junularo. F.R.G.

.........

kaj ne forgesu la Internacian Somerujon Primoŝten. Jugoslavio.

Por havi korespondadresojn pri tiuj renkontiĝoj skribu al:

Petro LEMARCHAND.
43, rue de Lessard.
76 - ROUEN.

( Ne forgesu kunsendi poŝtmarkon por la respondo. Dankon, kaj agrablajn feriojn.!!)

# V I V O  D E  L A  G R U P O J ;

ROUEN. Pioniro Forlasas nin.

La 8an de Decembro, la Sotteville'aj kaj Rouen'aj Esperantistoj adiaŭis Sinjoron Maurice Strub ĉe la tombejo en Sotteville.

Naskita en Puteaux la I3 - I2 - I883, S-ro Strub alvenis en Sotteville ĉe la komenco de la jarcento, kie li laboris ĉe la fervojista riparejo Buddicom.

Li kreis en tiu urbo; la unuan sempagan kurson de Esperanto, kaj ĝis la lastaj jaroj, fervoŝe apogis nian movadon.

Sur la ŝtono de lia tombo, oni povas rimarki grandan verdan stelon, kiun li gravurigis je la jaro I966 je la morto de sia edzino.

S-ro JOUIS.

SOTTEVILLE les ROUEN.

Pri la Sotteville Rouen grupo, nenio nova. La kursoj de Petro Quillaud ĝlate antaŭeniras ( IO gelernantoj ) Bedaŭrinde la nombro da gekursanoj de S-ino Lamy malkreskis de IO ĝis 2.

Ni kunvenis la I2an de Februaro por diskuti ĉu ni kune pretiĝos per memlernado al la diversaj Esperantaj ekzamenoj. Plie ni pritraktis diversajn lokajn problemojn.

S-ro Petro LEMARCHAND.

LES ANDELYS.

La Zamenhofa Kulturcentro pri Internacia Amikeco havis sian ĝeneralan kunvenon la 7an de Februaro en la Urbodomo. La ĉeestantoj finpreparis la infanan maskobalon, kiu okazis la 2Ian de Februaro en la urba junulcentro. Bona orĥestro ludis por la plezuro, ne nur de la infanoj sed ankaŭ de iliaj akompanantoj. Dum la paŭzo, ĉiu povis gustumi la bonegajn kukojn kuiritajn de kelkaj bonvolaj membrinoj de nia Kulturcentro kaj la ĵurio aljuĝis belajn premiojn al la plej bele alivestitaj infanoj La temo de la balo estis: " Infanoj el ĉiuj landoj " Premiiĝis unu Nederlandino, unu Alĝerianino, unu Aŭstrino, unu Hispanino, unu Indiano kaj unu Usonano.

Jam du lernantinoj aliĝis al la infankongreseto kaj du sinjorinoj al la U.K. en Londono.

S-ino J. VINCENT.

VIRE. La 27an de Januaro I97I komenciĝis Esperanto Kurso en " Maison des Jeunes et de la Culture 3 de Vire ĉiun merkredon je la 20a 30. En ĝi partoprenas almenaŭ I5 gelernantoj ( inter kiuj 2 pastroj.) Gin gvidas S-ro M. Colleu, staciestro. Vire.

La Esperanto tekston aldonitan al la ( trilingva )fadfolio pri Vire mendis multaj homoj el Francio kaj eksterlando. ( Argentinio I50 tekstoj menditaj!), Ĉekoslovakio, Germanio kaj Hispanio.

S-ro LEGRET.

ELBEUF.

Sinjoro Chamaret, nia bone konata propagandisto en Elbeuf, sendis al ni la interesan artikolon okaze de la eldono de poŝtmarko honore al la aviadisto Henri FARMAN. Ni donas ĉi-sube ampleksan eltiraĵon de la opinio de Sinjoro Farman.

" .... Il n'est pas donné à tout le monde d'être polyglotte, et avec les progrès incessants de la locomotion, il est necessaire que tous les peuples puissent se comprendre; une langue internationale, facile, à la portée de tous, est devenue absolument indispensable..... Vous trouverez encore nombre de gens qui vous diront : " A quoi l'Esperanto peut-il servir maintenant?...." Oh cette phrase ! l'ai-je entendue lorsqu'on raillait nos premières expériences d'aéroplanes.!

Heureusement, pour donner confianceaux néophytes, il y a Archdeacon, dont la foi soulève les montagnes, à moins qu'elles ne les franchisse ce qui est plutôt dans les aptitudes des aviateurs.

Je répéte que la création de l'Esperanto répond pour les aviateurs a un véritable besoin.....

" Les directeurs des Compagnies d'Aviation devraient s'entendre pour obtenir que tous les pilotes mécaniciens et employés des Aéroports et les opérateurs des stations de radio se mettent à l'Esperanto."
Je vous donne ceci comme exemple mais les autres moyens seraient bons.

" Personnellement, je m'engage à obliger mes pilotes et mécaniciens à apprendre l'Esperanto, tout au moins les quelques mots et phrases absolument utiles si, naturellement, les Directeurs d'Aréoports et les Directeurs de Lignes Aériennes s'engagent à en faire autant....

Se oni farus kiel li indikis ĉi-supre, tre certe, oni ne legus en la revuo " Esperanto " de Decembro 1970, la artikolon " Kial J.A.L. surmariĝis ", ĉu ne?

S-ro Gustave CHAMARET.

LE HAVRE.

La havraj geesperantistoj kunvenis kun la Fecampaj kaj la Yvetotaj gesamideanoj por festi " La Reĝoj " dimanĉon 14an de Februaro en la Kafejo " Le Prader " en Le Havre.

Unue Fraŭlinoj Gaillard kaj Caron amuzis nin per komika komedieto due, Sinjoro Caney interesis nin per sia talento pri prestidigitado. Kantoj kaj ludoj finis agrable la posttagmezon.

Kursoj. En la unua grado, ne plu estas, bedaŭrinde, gelernantoj. Male, en la dua grado, gvidata de S-ino Colleu, la kurso bone funkcias kun 7 gelernantoj.

S-ino PELLETIER.

LISIEUX Malmulte estas menciinde. De la monato Oktobro, S-ro Brisard gvidas unugradan kurson, ĉiulunde, en la Domo de la Junularo kaj Kulturo. Siaflanke, S-ino Rault hejme instruas Esperanton por unu Liceano. Pro mia longdaŭra malsano kaj operacio, mi ne povis gvidi kurson por progresantoj, mi intencas ĝin malfermi la 1an de Marto.

Sinjoro MARTIN.

YVETOT.

La I3an de Decembro, la Grupo organizis, okaze de la datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, intergrupan bankedon en Barentin. Ĉeestis 36 personoj, en tre gaja etoso.

La I7an de Januaro, ni festis la Rreĝojn en la Junulardomo. Proksimume 50 personoj partoprenis, el Fecamp, el Le Havre kaj kompreneble el Yvetot. Inter ni estis ankaŭ la urbestro, Dro BOBEE. Pluraj gereĝoj estis elektitaj, kaj ĉiuj manĝis , trinkis, kaj multe amuziĝis.

Krom tio, kunvenoj regule okazos vespere, la unuan sabaton de ĉiu monato, la kursoj bone funkcias, kaj la grupo vigle laboras al la preparado de la S.A.T.Amikara Kongreso.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

## - G R A V A   A L V O K O -

### --- MON - PETOJ POR AĈETI PRES-MAŜINON. ---

Ek de la komenco de pasinta jaro la Kuktura Centro de Yvetot prizorgas la presigon de nia gazeto. Ciufoje, ni petegas la estrinon de la Junulardomo por presigi per ĝia pres-maŝino.

Ĉu ni ĉiam kaj dum longa tempo povos uzi ĝin?

Ni ne povas scii. Do, tial ni petegas la normandajn Esperantistojn por aĉeti al " La Normanda Unuiĝo " tiun pres-maŝinon tiom deziratan.

Por ke vi sciu pli bone, ĝi kostas pli ol I.000 Frankoj.
Ni povos havi rabatilon ( I0% ) ĉe la komercisto.; kaj la grupo jam povos pagi iomete.
Ni aperigos ĉiufoje la sumon kaj la nomojn de la donintoj

- Antaŭan Dankon.....

Sendu ĉekon al s-ro Jouis.

S-ro B. SAUNIER.

P.S. Tamen povas esti ke iu havas bonegan ideon por aranĝi la aferon;

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## - A T E N T U -

## - A D R E S - Ŝ A N Ĝ O J -

En kazo de adresŝanĝo, bonvolu tuj sendi al ni vian novan adreson por ke la bulteno ne revenu!!!

Jam revenis la bultenoj de:

S-ro BRISARD.   S-ino TANGUY.   S-ro LECOULTEUX.   S-ino ROCQUES

Se vi scias la novajn adresojn de tiuj samideanoj; bonvolu tuj sendi ilin al ni. Dankon.!!!

:-:-:-:-:-:-: -:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-


## K I U   D E Z I R A S   K O R E S P O N D I ??

Ni havas adresojn de gejunuloj kiuj deziras korespondi kun francoj.

Skribu al . S-ino POTTIER Claudine;
50 Residence Fief de Caux. 76 - YVETOT.

## - I V E T O -


En la urbo de Yvetot;
Fama pri la memoraĵo
De la urbo : La Reĝeto,
Kiu vivis sen damaĝo



Estis ĉio tre mildece
Trinkis multe da pomvino;
Ellitiĝis ne fruece
Enlitiĝis je tagfino;

Dormis li sen la prestiĝo
Amis sian Johaninon,
Vivis, ja, en Kvieto;
Ĉiu amis la reĝinon

Tie, reĝo vivis paçe,
Ankaŭ la regionanoj
Tiel, ke ni tre aŭdace
Urboplanas, ni, urbanoj.



Meze de la Mara Sejno
Por la urbo tiel kara
Ĉar ne estas ia ŝajno
Nur certaĵo, ho tutkora

Ĉio finas per kanzonoj
Ĉen ni. Jene provo tie
Estas por la kotiljonoj
Kanti la dancadon ĉie.

- Fraŭlino FERCOQ.

Oni povas aldoni fine de strofo :
( bis ) Trinku litrojn du, don, don.

Polycopié par le Centre Culturel d'Esperanto. Yvetot.

- DEPOT LEGAL Ier TRIM. 7I.
La Gerante Mme POTTIER Cl.